c1/9 24.25 34 PREFECTURE D'ALGER non après

ESPERANTO EBLIGAS AMIKECON INTER PLEJ MALPROKSIMIGITAJ HOMOJ

Sol 2

5 Januaro 1906.

LA
ALĜERIA STELO

L'ÉTOILE ALGÉRIENNE

Duonmonata Oficiala Organo de la Grupo Esperantista de Alĝero kaj de la Nordafriko

BIBLIOTHÈQUE NATIONALE R.F. IMPRIMÉS

DIRECTEUR FONDATEUR
Barthélemy BALS

ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

Prix de l'Abonnement annuel		Kosto de la Jara Abono	
Algérie, Tunisie.....	2 fr. »	Alĝerujo.....	2 fr. »
France	2 fr. 50	Francujo, Tunisujo.....	2 fr. 50
Etranger.....	3 fr. »	Eksterfrancaj landoj.....	3 fr. »

Journaux 8878

ALĜERO
PRESEJO ESPERANTISTA, J. TORRENT, 57, RUE D'ISLY

1906

5 Januaro 1906. DUA JARO N° 1 (19)

LA ALĜERIA STELO

OFICIALA ORGANO
De la Grupo Esperantista de Alĝero
KAJ DE LA NORDAFRIKO

BONAN JARON !

La « Alĝeria Stelo » sendas al ĉiuj siaj legantoj siajn plej korajn bondezirojn por la nova jaro 1906.

Al ĉiuj ni deziras bonan kaj feliĉan jaron.

« LA ALĜERIA STELO ».

Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

KUNVENO DE LA KOMITATO.

En ĝia kunveno de la 17-a de decembro, la Komitato de la Grupo Esperantista de Alĝero kaj de la Nordafriko elektis S-ron Moinard kiel kasisto por anstataŭi S-ron Baxès, kiu, pro malsano, ne povas daŭrigi tiun oficon.

La grupanoj devas do sin turni. por la pago de la kotizaĵoj, al S-ro Moinard, 27, rue Aubert, Mustapha.

La ĵurnalo « La Alĝeria Stelo » estis elektata kiel oficiala organo de la Grupo.

La ĝenerala kunveno de l'jaro 1906 okazos dimanĉon, la 21-an de januaro, je la 9 1/2-a matene, ĉe la urbestrejo. Dum tiu kunveno, la societanoj devos elekti trionon de la komitataro. Jen estas la nomoj de la komitatanoj kiujn oni devas anstataŭi aŭ reelekti : S-roj Murat, Coulon kaj Baxès.

Avizo estos adresata ĝustatempe al ĉiuj societanoj.

VERDA STELO.

EN RUSUJO PER ESPERANTO

Tre ofte, kiam mi parolas pri Esperanto kun samideanoj, tiuj homoj al mi diras kun duonmokema rideto : « Certe lingvo internacia, teorie, estas afero bonega, kaj nenia saĝa homo povas « kontraŭdiri pri tio. Sed ĉu ĝi estas afero praktika kaj efektiv- « ebla ? Ĉu via Esperanto estas tute plena lingvo, sufiĉa por ia « ajn bezono ? Vi diras al mi ke ia Anglo babilis kun ia Ĉeko « dum unu horo esperante. Bonege. Sed tiuj homoj kunparolis « nur pri specialaj objektoj, eble antaŭe de ili preparitaj, kaj « post tiu unuhora paroladeto, ili rapidis reiri al iliaj samlingv- « anoj, uzante ree iliajn naciajn lingvojn, ĉar kredeble ili ne « povus per ia artefarita parolilo, esprimi la ĉiuspecajn senĉese « ŝanĝantajn ideojn naskitajn de iliaj rilatoj kun la homaro. » Mi certigas ke Esperanto estas, de nun, tre plena kaj tre sufiĉa ilo por ia bezono de la ĉiutaga vivado ; sed ofte miaj kunparol- antoj malkredeme ekkrias : « Nu, sincerege, ĉu vi kredas ke ia « homo povas, en fremdlingva lando, vivadi kaj rilati kun aliaj « homoj nur per Esperanto ? » Kaj mi kviete respondas : « Nu, « sincerege, mi kredas kaj certigas ke homo povas tion fari, ĉar « mi mem konas homon tian, kiu estas mi ! Mi mem vivadis « dum ses semajnoj en fremda lando, uzante nur unu lingvon : « Esperanto. »

Tiu respondo, kompreneble, mutigas miajn kontraŭdirantojn, kaj ĉar mia eksperimento povas doni utilan argumenton al niaj samideanoj dum similaj disputadoj, mi deziras doni pri ĝi kelkajn detalojn.

Mi eklernis Esperanton kvar jarojn antaŭe. Tiam, mi estis sola esperantisto en Alĝero, kaj tuj kiam D-ro Zamenhof presis mian nomon en sia adresaro, mi ricevis tutan pluvegon da poŝtkartoj kaj kelkajn leterojn. Mi tre rapide kutimiĝis pri la lingvo internacia, respondante al tiuj multaj korespondantoj. Inter ili estis tre interesa kaj simpatia Ruso, D. V. S., administracia oficisto kiel mi, kaj fotografisto por plezuro kiel mi, ankaŭ. Ni interŝanĝis leterojn kaj fotografojn ; niaj korespondaj rilatoj pli kaj pli oftiĝis kaj ni estis baldaŭ tre intimaj amikoj. . letere.

De tio la sekvaĵo estis nepra : fine, ni tre deziris efektivə konatiĝi unu kun la alia. Por kelkaj kaŭzoj mia amiko ne povis alveturi en Alĝerujon, kaj li, en ĉia letero sia, insiste petis min por ke mi vizitu lin en Rusujo. Tia vojaĝo estis al mi gravega entrepreno, ĉar ĝi postulis nepre du kondiĉojn iom maloftajn ĉe administraciaj oficistoj : sufiĉe da tempo libera kaj sufiĉe da

mono ! Sed dezirego estas tre agema kunhelpanto, kaj fine mi sukcesis aranĝi ĉion por ebligi mian vojaĝon. Io estis ankaŭ tre embarasiga : la lingva afero, ĉar bedaŭrinde Esperanto ne estas ankoraŭ parolata de ĉiuj Rusoj, kaj por mia veturado mi bezonis eklerni parkere kelkajn rusajn frazetojn. Ve ! kian malfacilegan lernadon mi faris por diri nur malmultajn vortojn, eble tute ne kompreneblajn ĉar mi ne konis la efektivan rusan elparolon. Kia malsimileco kun nia tiel facila Esperanto !

Ĉion preparinte, mi ŝipe veturis el Marseille kaj el tiu havenego rekte al Konstantinopolo, kien mi alvenis post sestaga marvojaĝo. El tiu urbego mi intencis alveturi en Odeson, kie estimata verkisto, S-ro Gernet, afable proponis al mi sian gasteman domon por ĉeestadeto ; li intencis helpi mian malspertecon pri Rusujo kaj meti min en vagonaron alirantan al Kievo kaj al Sumoj, urbeto de la Ĥarkova provinco kie loĝas mia amiko. Sed, bedaŭrinde, la ribelado de la militŝipo « Kniaz Potemkin » malhelpis la plenumon de tiu bonega plano, kaj post kelkaj tagoj de promenado en Konstantinopolo, mi devis ŝipveturi al Konstanĝo, ĉefhaveno de Romanujo, iri fervoje al Bukaresto, poste al Ĉernovico, urbo de la orienta Aŭstrujo, kaj fine eniri en Ruslandon tra Novosedlico.

Certe en Romanujo kaj orienta Aŭstrujo estas esperantistoj, kiuj kredeble helpus mian vojaĝon : sed mi ne sciis iliajn adresojn, tre malsprite forgesinta preni kun mi la esperantistan adresaron. Mi do devis trairi la tutan Rumanujon kaj parton de Aŭstrujo sen helpo de nia internacia lingvo. Kaj ĉar mi sciis nek la rumanan, nek la germanan, nek la polan lingvojn, mi estis ofte tre embarasata. Ekzemple mi memoras tre ridindan okazon, kiam, vane provinta paroli france aŭ angle, kaj nepre bezonanta preni kelkajn sciigojn pri nia vagonaro, mi fine ekprovis demandi dekkvinjaran gimnazianon per la latina lingvo ! Kia abomena, — ne eĉ « kuireja », sed « fervoja » — latina lingvo ! Certe la spirito de Cicero tremigis pro ĝia abomeneco, aŭdante tian strangan latinaĵon... Nun mi ridas volonte pri tio, sed tiam, la afero ŝajnis al mi multe malpli agrabla !

Daŭrigota. VOJAĜANTO.

POUR LA PROPAGANDE

Dans un but de propagande et pour procurer aux divers groupes les moyens d'avoir une revue qui entretienne entre leurs divers membres des liens d'amitié et de confraternité, nous offrons la combinaison suivante :

Nous imprimerions, spécialement pour chaque groupe, quatre pages supplémentaires dans lesquelles nous n'insèrerions que les questions relatives au groupe affilié et les articles des « grupanoj » qui nous seraient envoyés et nous expédierions, à nos frais, au président ou au secrétaire, 100 exemplaires de notre revue complète pour le prix de 15 francs par numéro.

Cette combinaison est très avantageuse, si l'on considère que nous ne calculons, dans ce prix de 15 francs, que les frais de composition et de papier des quatre pages supplémentaires que nous offrons aux groupes. Ce serait également une satisfaction pour les « grupanoj » qui écrivent des articles (originaux ou traductions), de pouvoir les faire imprimer à peu de frais.

Nous pourrions également faire des tirages à part des articles insérés dans notre revue, et cela sous le titre de : Editions de « La Alĝeria Stelo ».

Nous prions les groupes que cette proposition pourrait intéresser de vouloir bien nous en aviser au plus tôt, afin que nous puissions prendre nos mesures en conséquence.

LA DIRECTION.

DIVERSAĴOJ

LA VENONTA UNIVERSALA ESPERANTISTA KONGRESO

El Svisujo, oni sciigas nin, ke, laŭ decido de la Centra Organiza Komitato, kiu akceptis la inviton de la Svisa Esperanta Societo, la dua Universala Kongreso de Esperanto okazos en Ĝenevo, dum septembro 1906.

ESPERANTO EN ANGLUJO.

Antaŭ nelonge, S-ro Oswald Browning paroladis ĉe l' granda aŭditorio en Cambridge, kaj li diris : « Kvankam Esperanto estas la 28-a de l' diversaj lingvoj kiujn oni provis, mi konstatas, ke ĝi estas la plej utila el ĉiuj ».

PREMIÈRES IMPRESSIONS

Il semble que notre belle Algérie ait le pouvoir surnaturel de faire vagabonder notre esprit et de transformer notre pensée en un papillon qui voltige de droite à gauche. En effet, tout en étant Algérien, nous admirons sans cesse le pittoresque de notre Blanche-Alger, comme le ferait un touriste mettant, pour la première fois, ses pieds sur le sol d'Afrique.

Ce doux climat qui est une éternelle caresse, ce beau ciel bleu et enchanteur, ce soleil étincelant, cette mer calme, ne contribuent-ils pas pour une large part à faire, des visiteurs de notre cité, des âmes de poète ?

Pour les touristes, leur arrivée à Alger est un vrai régal, car le bas de la ville semble un jardin dont le boulevard de la République est la superbe terrasse. Aussi est-ce merveille pour ces étrangers que de trouver, en ce lieu que berce légèrement la brise de la Méditerranée, un hôtel où ils trouveront tout ce qu'il leur sera possible de désirer.

Dès leur entrée dans le port, ils peuvent apercevoir, au haut d'un bâtiment gigantesque, l'inscription OASIS : c'est l'hôtel qui leur est tout spécialement désigné. Là, ils pourront savourer la douceur d'un séjour qui leur paraîtra, hélas! trop court.

Tout près, au milieu du charme de ce boulevard, se trouve le Square Bresson. Ce square est le souvenir de faits algériens : au même emplacement du kiosque de la musique, se trouvait la Koubba de Sidi-Betka, dont le nom est encore en grand honneur parmi les Musulmans.

Tandis qu'assis dans le square, on goûte un agréable repos, bercé par le léger bruissement des feuilles pendant que s'agitent doucement les bambous peuplés de mille oiseaux nous charmant de leur voix, on sent qu'autour de soi règne la vie au sein de cette nature pittoresque ; les rues sont bourdonnantes de mouvement ; devant nos yeux défilent, tour à tour, des Turcs, Egyptiens, Kabyles, des Anglais tout de gris habillés avec leur inoubliable parasol. En un mot, c'est le premier endroit idéal du touriste qui se propose de visiter les sites enchanteurs de l'Algérie.

Nous osons espérer que la caravane d'Espérantistes qui doit, sous peu, partir de Paris à destination de l'Algérie, ne manquera certainement pas de s'arrêter quelques instants en ce parc algérois où ils jouiront d'une fraîcheur câline, à l'ombre des grands ficus.

BARTHÉLEMY BALS.

Speciale esperantigita por *Algeria Stelo*.

LA MORTO DE MARTINO, LA PAŜISTO

Anekdoto de la ribelo de 1898, en Milano

La 10-an de majo 1898, Martino agoniis ĉe la domo de sia filo Tomaso. La medicinisto estis vizitinda lin, sed nenion povis diri, nenion fari. Ĉiutage, Martino pli malboniĝis.

Li tremis aŭdante la paroladoj de sia filo Tomaso kaj de lia filo Mario, diboĉulo kies la edzino estis vanta, neamema kaj malfidela ; pro tio, li konsumiĝis.

Je la lasta tago de aprilo, lin ekprenis la febron, tial, tute konsumita, li kuŝiĝis kaj, antaŭ nelongatempo, li estis mortanto. La ĉambro, en kiu agoniis la paŝisto, kiam ni eniris, montris ĝojan majan matenon tra la brilaj vitraĵoj de l' balkonfenestro. Nur la purpuraj kurtenoj de tiu pordo kribis helan lumon. . Ĉirkaŭ la morto, brilis la rido de l' vivo.

Apud la lito, sur tableto altare ordigita kaj kovrita per blanka lintolertuko, senĉese brulis du funebraj kandeloj, kiujn la juna vikario portis antaŭ malmulte da minutoj. Oni ankoraŭ aŭdis en la ŝtuparo la paŝojn de la servisto de preĝejo kaj de la ekleziulo, kiuj malproksimiĝis.

Kvieta kaj religia silento plenigis la ĉambraron. Le vikario, apud la lito, kuraĝigis la mortanton. Tomasa, je l' piedo de l' lito, kun la manoj krucigitaj, silente staris, rigardante sian patron. Ĝi ŝajnis ke nun la animo de Martino estus tute liberigita pri iaj maltrankvilecoj, timoj, malĝojoj kaj turmentoj.

Li tie kuŝis sur la lito kun la kapo dolĉe deĵetata sur kapkusenoj ; li havis okulojn malfermatajn kaj supre fiksatajn ; siaj manoj estis vakskolore. Sia vizaĝo montris pacon kaj dian trankvilecon. Nesentebla rideto malfermetis sian buŝon : li ŝajnis rezoni kun nevideblaj fantomoj pri ĝojaj aferoj. Super sia blanka kapo, brilis suna lumeco.

Subite, li ekaŭskultis, kiel ĉu voĉo alvokis lin, poste, li supren altigis manojn, ĝi ŝajnis ke nevideblaj manoj volus ilin altiri. Maltrankvile, li supren rigardis. Ĝi ŝajnis ke, ĉe la ĉielo, festo okazus, sed ke, por ĝin plenumi, oni nur atendus Martinon.

(Daŭrigota)

DON BERNARDINO RICCI.

Esperantigis GRAFFO ALBERT GALLOIS.

Dekkviŋaŭgusta Ordeŋito

Ian vesperon, en Alĝerio, je l' fino de ĉasa tago, mi reiris la urbon Orleansville, kiam sur la Ŝelifan ebenaĵon ekokazis granda pluvego. Oni vidis nenian vilaĝon aŭ karavanejon, nur multajn etajn palmujojn aŭ pistakujojn kaj grandegajn plugitajn terojn ĝis la limo de horizonto. Plie, la rivero Ŝelifo pliigita de la pluva falego ekronkis terure kaj mi estus devigita pasigi tie la nokton meze de marĉejo.

Feliĉe, la tradukisto de la Araba Oficejo (1) de Miliana, kiu akompanis min, ĝustatempe rememoriĝis ke proksime de ni, kaŝita en valeto, kuŝis tendaro, kies aga'o (2) estas konita de li, kaj ni decidis ke ni iros peti al tiu gentestro ke li gastigu nin tiun nokton.

Tiuj arabaj vilaĝetoj de la ebenregionó estas tiel internigitaj en la barbariaj figujoj kaj aliaj similaj kreskaĵoj, iliaj branĉdometoj estas tiel malalte konstruitaj, ke ni troviĝis meze de l' duaro (3), ne ekvidinte ĝin. Ĉu estis la malfrua horo, ĉu la pluvo, tiu granda silento ?... Sed la loko ŝajnis al mi tre malĝoja kaj kvazaŭ premegita de ia malfeliĉego, kiu tie estis interrompinta la vivadon.

Sur la kampoj de la tuta ĉirkaŭaĵo la rikolto estis nezorgita. La grenoj, la hordeoj ĉie aliloke kolektitaj tie estis kuŝitaj, putriĝante kie ili kreskis. Herpiloj, plugiloj rustigitaj kuŝis forlasitaj sub la pluvo. La tuta gento havis tiun saman ŝajnon de malĝojeco aŭ forlaseco. La hundoj bojis apenaŭ pro nia alveno. De tempo al tempo, funte de unu el tiuj dometoj nomataj gurbi'oj, oni aŭdis infanajn kriojn kaj oni vidis trairante enla densejo la senharan kapon de ia bubo aŭ la haik'on (4) de ia maljunulo.

Tie ĉi aŭ tie, azenetoj frosttremantaj inter la arbetaĵoj. Sed nenia ĉevalo, nenia viro... kvazaŭ okazus ankoraŭ la grandaj bataladoj kaj ĉiuj rajdistoj foririntaj de longaj monatoj.

La domo de la aga'o, longa farmdomo kun blankaj senfenestraj muroj ne ŝajnis pli viva ol la aliaj. Ni trovis la ĉevalejojn malfermitajn kaj malplenajn sen la ĉevalisto por ricevi niajn bestojn. « Ni iru al la maŭra kafejo », diris mia kunulo.

---

1) Milita Alĝera administracio.
2) Araba estro
3) Aro de dometoj.
4) Granda ŝtofaĵo kovrante ĉiujn vestaĵojn de la Orientanoj.

La loko nomita maŭra kafejo estas kiel la salono por vizitantoj de la arabaj kastelanoj ; domo en la domo rezervita por la migrantaj gastoj, kiu ebligas al la Mahometanoj tre gastamaj, ke ili akceptu la diritajn vojaĝantojn, gardante samtempe la familian intimecon ordonitan de la lego.

La maŭra kafejo de l' aga'o Si Sliman estis malfermita kaj senbrua, kiel liaj ĉevalejoj. La altaj muroj kalke blankigitaj, la armilaj ornamaĵoj, la plumoj de strutoj, la larĝa kaj malalta kanapo ĉirkaŭ la ĉambro, ĉio disfluis sub la pluva akvo enpelita de l' ventego tra la pordo.

Tamen, iu troviĝis en la kafejo ; unue la kafeisto, maljuna Kabilo vestita de ĉifonaĵoj, sidanta sur siaj kalkanoj, lia kapo inter liaj genuoj apud fajrejo renversita ; poste la filo de l' aga'o, bela infano, febra kaj pala, kiu ripozis sur la kanapo, envolvita en nigra burnuso, kun du grandaj leporhundoj ĉe siaj piedoj.

Kiam ni eniris, nenio moviĝis ; apenaŭ unu el la hundoj movis sian kapon kaj la infano provis direkti al ni sian belan okulon nigran, febrigitan kaj konsumigitan.

— Kaj Si Sliman ? demandis la tradukisto.

La maljunulo faris super sia kapo ian nedefinitan geston montrante la horizonton malproksimen, tre malproksimen...

Ni komprenis ke Si Sliman estis foririnta por granda vojaĝo ; sed, ĉar la pluvo malebligis nian vojiron, la tradukisto, sin turnante al la aga'ido, diris per araba lingvon ke ni estas amikoj kun lia patro kaj ni petas ke li gastu nin ĝis la morgaŭo. Tuje, la infano leviĝis malgraŭ la malsano, kiu lin bruligis, donis ordonoj al la kafeisto kaj per ĝentila ŝajno montrante al ni la kanapojn kvazaŭ li dirus : « Vi estas miaj gastoj ». Li salutis laŭ la araba maniero, kaj fiere envolvante sin en siaj burnusoj, li foriris kun mastra kaj aga'a graveco.

(Daŭrigota)

A. DAUDET.

Esperantigis A. BAISSAC.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accent. de la Maison TURLOT, CHAIX et C^ie^, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo

22 Januaro 1906. DUA JARO N° 2 (20)

LA ALĜERIA STELO

OFICIALA ORGANO
De la Grupo Esperantista de Alĝero
KAJ DE LA NORDAFRIKO

Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE DU 21 JANVIER 1906

La séance est ouverte à 9 heures et demie, sous la présidence de M. Saussol, vice-président. Dans une courte allocution, M. Saussol remercie les sociétaires présents d'avoir répondu à l'appel du Comité et donne lecture à l'assemblée d'une lettre de M. le D-r Bresson, qui, pour des raisons de santé, se voit obligé de donner sa démission de Président du Groupe ; néanmoins, il reste fervent espérantiste et membre du Groupe et du Comité. La parole est ensuite donnée à M. Aubert, vice-président, qui, avec sa verve habituelle, fait l'exposé des progrès de l'Esperanto pendant l'année 1905 et indique aux sociétaires les moyens de propager l'Esperanto autour d'eux.

Au cours de la séance, nous avons eu le plaisir de la visite de M. Moscheles, président du groupe espérantiste de Londres, qui a félicité M. Aubert pour son magnifique discours et un télégramme de sympathie a été envoyé au groupe londonien par les « grupanoj » d'Alger.

M. Roux, secrétaire général, fait l'exposé de la situation morale et financière du Groupe, qui est excellente. Il annonce que M. le D-r Zamenhof a accepté la présidence d'honneur du groupe.

On procède ensuite au vote pour le renouvellement partiel des membres du Comité. Ont été élus : Mme Neyrand, M. Moinard et M. Coulon (membres sortants). M. Coulon, en quelques mots aimables, remercie l'assemblée de l'avoir réélu et promet de faire tout son possible pour intéresser les instituteurs à l'Esperanto.

Les membres du Comité se réunissent ensuite pour nommer un président en remplacement de M. le D-r Bresson, démissionnaire. A l'unanimité, M. Maurice Aubert est élu président du groupe espérantiste d'Alger et de l'Afrique du Nord.

Après un échange de félicitations, la séance est levée à 11 heures et demie.

STELETO.

EN RUSUJO PER ESPERANTO

(Sekvo kaj Fino)

Fine, mi trapasis la rusan limon, alvenis al Kievo, poste al Vorojbo, kie mia amiko rusa promesis renkonti min. Jam de dekkvin tagoj mi estis lasinta mian patrujon, senĉese traveturinta pli kaj pli malproksime en tute fremdajn al mi landojn. Kia ŝanĝego rilate al mia kutima franca vivado! Ĉio estis al mi nekonata kaj tre ofte nekomprenebla; mi atendis malpacience kaj ankaŭ malkviete tiun momenton kiam mi unuafoje vidos mian korespondanton. Ĉar mia nuna situacio je li estis iom stranga. Ni ambaŭ tre intime amikiĝis sed nur koresponde. Kio estos kiam ni reale konatiĝos? Eble ĉia el ni estos tre miriganta ekrimarkante ke la alia estas tre malsimila je sia supozo, kaj, ĉar la homa simpatio estas tre malsimpla sento, eble tiu efektiva konatiĝo tute malŝavigos nin; eble, ĉefe, ni ne povos kompreni unu la alian, ĉar la Slavanoj havas apartan elparoladon tiam al mi tute nekonatan, kaj mia amiko lernis Esperanton sola, nur per libroj, kaj neniam parolis esperante kun nerusa esperantisto! Kiom ridinda kaj ankaŭ malĝojiga estus mia situacio, se ni ne povus kompreni unu la alian, post tiom longega veturado farita de mi por konatiĝi kun li! Mia amiko estis la sola kaŭzo de mia veno tien, la sola ebligo de mia ĉeestado en tiu lando, al mi tute fremdlingva, kaj se nia renkonto ne sukcesus, al mi restus unu solvo povebla: tuj returnen veturi honteme post laciga, tre elspeziga kaj tute senrezultata vojaĝego!

Nu! miaj antaŭtimoj estis tute vanaj: nia mirinda Esperanto tuj kaj bonege plenumis ĝian rolon, kaj plene, facile rilatigis nin. Mi ankoraŭ tre klare memoras mian feliĉan impreson, kiam, alirinta al la loko antaŭkonsentita, mi subite sentis brakojn frate ĉirkaŭpreni min, kaj voĉon kompreneblan, fine kompreneblan, alvoki min amike! Tiu kiu vojaĝis dum tagoj sola inter homoj alilingvaj, devigata ludi la rolon de mutulo, tiu povos kompreni mian plezuregan senton, aŭdante nian ĉarman lingvon internacian, kiu igis min fine komprenantan kaj parolantan homon! Kompreneble, estis kelkaj malsimilaĵoj inter niaj interparoladoj: ekzemple, mia amiko komence iom miris ke mi kelkfoje, pro mia neatenco, akcentis la lastan silabon de miaj vortoj, laŭ nia franca kutimo; mia vice, mi rimarkis ke lia Malgranda-Rusa elparolo iom miksigis la sonojn « g » kaj « h », « aj » kaj « e ». Sed ni facile forpelis tiujn negravajn malkorektaĵojn kaj post unu horo ni tre facile, tre nature kunbabiladis!

Tuj mi sentis min kvazaŭ fraton de tiu ĝis nun ne vidita amiko; tuj Rusujo ĉesis esti al mi fremda, indiferenta lando, kaj per tiu persona eksperimento, mi klare komprenis kia potenca rilatilo kaj rimedo por solidareco kaj amikeco inter diversaj popoloj estos nia lingvo, se iam ĝi estos ĉie komprenata. Milfoje dankata estu nia estimatega majstro D-ro Zamenhof, kiu ĝin eltrovis! Dank' al li, mi povis vivadi en Rusujo kvazaŭ mi estis efektive Rusano. La familio de mia amiko, en kiu estas aliaj esperantistoj, ricevis min kvazaŭ familianon, liaj amikoj, kvazaŭ amatan konatulon. Mi povis, dank' al lia traduko, sen ĝene kaj tre intime rilati kun tiuj tre simpatiaj homoj kaj vivadi efektive per la rusa maniero dum ses semajnoj. Tio estus tute nepovebla al iu ajn vojaĝanta sole kiel mi en Rusujo kaj ne parolanta la rusan lingvon.

Nun, antaŭ ol fini tiun artikolon, mi permesas al mi fari rimarkon. Kredeble, inter miaj legantoj, kelkaj, dum nia varma kaj laciga somero alĝeria, forflugas al pli malvarmetaj landoj, eble en fremdlingvajn landojn. Al ili mi treege konsilas pruvi tiun saman eksperimenton kiun mi faris. Certe, ili ne iru nun en Rusujo: tiu vojaĝo estus iom tro riska! Sed ili antaŭe konsentu kun esperantistaj korespondantoj de alia fremda lando. Certe ili ne bedaŭros ilian vojaĝon; tiel farante, ili ricevos personan kaj agrablegan profiton el ilia scieco de la internacia lingvo, kaj, samtempe tre efike helpos al disvastigado de Esperanto, ĉar ili poste povos facile mutigi tiujn kiuj neas ĝian praktikan utilecon, kaj ilia ekzemplo certe incitos multajn aliajn eklerni nian karan lingvon! Tiel ili baldaŭigos la feliĉan momenton de ĝia efektiva internacieco!

VOJAĜANTO.



DIVERSAĴOJ

KELKAJ TROJANAJ KUTIMOJ AŬ SUPERSTIĈOJ.

1) Pli malmulte kleraj Trojananoj kredas, ke ĉiu malsanulo estas nepre ŝtupinta iam sur loko verŝita per sapakvo, ĉar tie troviĝas spiritoj kaŭzantaj malsanon.

2) Je nova jaro (1-an de januaro), la Trojananoj manĝas kokviandon; je Kristnasko (25-an de decembro), ili manĝas pork-

viandon ; je Sankta Nikolao (6-an de decembro), karpviandon, kaj je Pasko (kiam ajn ĝi okazus), ovojn kolorigitajn, ĉar tiaj manĝaĵoj kvazaŭ resanigas.

3) Dum la somero kaj aŭtuno, gefraŭloj kunveniĝas ie vespere, kie fraŭlinoj ion laboras kaj ambaŭ faras eksperimentojn por enamiĝado, ĉar aliloke tio ĉi preskaŭ estas neebla.

(Daŭrigota) P. STOJEV, Trojan (Bulgarujo)

INTERNACIA REVUO MEDICINA.

Ni ricevis la unuan kajeron de tiu Revuo, kiu nepre tre interesos la tutan kuracistaron. Tre bone redaktata en lingvoj franca, angla, itala, kaj fine esperanta, la « Internacia Revuo Medicina » estos baldaŭ la komplemento de ĉiuj la medicinaj bibliotekoj.

La kosto de la jara abono estas 12 frankoj. Oni povas sin turni al la Presa Esperantista Societo. 33, rue Lacépède, Paris.

DEKTRIOPE !

Tia estas la titolo de unuakta salona komedio, tradukita de Grafo Albert Gallois.

Tre lerte verkita, tiu komedio taŭgus kiel bona propagandilo ĉe la esperantistaj kunvenoj kaj povas esti ludata de la grupanoj mem, kiuj nepre estos multe interesataj per tiu beleta rakonto de la ordinara vivo.

« Dektriope ! » estas aĉetebla ĉe l' tradukinto, Grafo Albert Gallois, en Riolunato (provinco de Modena), Italujo, po o fr. 80, afrankite.

PRI NIA TITOLO « LA ALĜERIA STELO »

Diversfoje, ni petis el niaj kunfratoj, kiuj enpresas la nomon de nia revueto, ke ili bonvolu enpresi ĝin korekte. Kelkaj el ili ankoraŭ enpresas « La Alĝera Stelo » anstataŭ ol « La Alĝeria Stelo ». Ni petegas ilin korekti tiun eraron, pro la poŝtaj malfacilaĵoj. Efektive, kiam ni ricevas poŝtmandaton je l' nomo de « La Alĝera Stelo », ni estas devigataj fortiri el niaj poŝoj ĉiujn aferojn pruvantajn ke ni vere estas la posedantoj de nia « Alĝeria Stelo ».

Tedinda afero, ĉu ne vere ?

ĜIS NUN RICEVITAJ ABONPAGOJ.

Grafo A. Gallois ; D-ro Saquet ; S-ino Cathiard ; S-roj A. Baissac ; A. Capé ; Roux ; Moinard ; S-ino Neyrand ; S-ro Saussol ; D-ro Richard ; Kap-no Besson.

KOREGAJN DANKOJN.

UNE ANGLAISE ?

Il nous a été donné de juger que nombre de personnes s'intéressent à notre gazette et à sa bonne rédaction.

En effet, nous avons pu voir avec quel empressement on s'acharne à nous faire savoir que tel ou tel auteur a laissé echapper, dans son article, une faute, ô, mon Dieu, combien grave ! par exemple, un N au lieu d'un U, ou encore un L au lieu d'un T. Et pourtant, ces fautes n'incombent nullement à l'écrivain, mais bien à nos braves typos, qui appellent cela, selon les termes de leur métier, des « coquilles ».

C'est ainsi que dès l'apparition de notre numéro 1 de la deuxième année, on nous a retourné un exemplaire dont la cinquième page, « Premières Impressions », portait des corrections à l'encre rouge et dont l'envoyeur avait souligné ce passage : « ... des Anglais tout de gris habillés avec leur inoubliable parasol !!!... » Puis, au bas de la page, étaient, également à l'encre rouge, ces mots : « Une Anglaise ? » qui ont été pour nous une énigme dont nous n'avons encore pu trouver la solution. Nous attendons donc qu'on veuille bien nous en donner l'explication. Nous avons toujours remercié ceux d'entre nos lecteurs qui ont bien voulu guider nos premiers pas, et nous leur serions reconnaissants de nous continuer ce service.

Néanmoins, nous ne saurions trop recommander aux personnes qui prennent à tâche de nous signaler les errata, de vouloir bien revêtir de leur signature l'exemplaire corrigé qu'elles nous font parvenir, ainsi que de l'adresser à la Rédaction de « La Algeria Stelo » et non à l'Imprimerie Torrent qui n'a rien de commun avec le journal.

BARTHÉLEMY BALS.

Spritaĵoj

— Mi pardonpetas, sinjorino ; sed .. kial vi tiel malafable min rigardas ?

— Oh ! pardonu vi min, sinjoro : mi supozis ke vi estas mia edzo !

Poeto deklamis kelkajn versojn siajn al Talleyrand en strato ; tiu ĉi montris al li iun starantan malproksime kaj oscedantan : « Pli mallaŭte, li ekkriis timeme, tiu homo vin aŭdas ! »

ŜERCULO.

Esperanta Ekspozicio en Amiens

En la jaro 1906-a okazos, en urbo Amiens (Francujo), grandega ekspozicio nacia kaj parte internacia, je kiu la grupo esperantista intencas partopreni. Je tiu ĉi ekspozicio partoprenos ĉiuj plej gravaj firmoj de la pikarda kaj nordfranca industrio, multaj aliaj el la cetera Francujo, kaj eĉ kelkaj el eksterlando. Ĝi estos enloĝigata sur la vastegaj herbejoj de la belega promenejo — La Hotoie — granda je 250.000 kvadratmetroj. Jam nun ok allegaj kaj grandegaj konstruaĵoj staras sur la ekspoziciejo, kaj multego da ĉiufakaj laboristoj penadas por starigi la ceterajn. Estas de nun certe, ke la Amiens'a ekspozicio estos gravega okazintaĵo kaj havos plenan sukceson. Ĝi estos certe, dum la tuta printempo kaj somero, vizitata de centmilioj da francoj kaj fremduloj.

Pro tio, la grupo esperantista de Amiens petis kaj ricevis de la ĉefdirektoro aparta lokon por esperantista ekspozicio. La komitato opiniis, ke la plej forta efiko estos atingata, se estos precipe elmontrata la disvastiĝo de Esperanto en plej diversaj landoj de la mondo. Tial ĝi turnas sin konfideme al ĉiuj nefrancaj grupoj, al ĉiuj esperantistaj eldonistoj, petante ke ĉiu el ili bonvolu sendi al ĝi po kelkaj specimenoj (du aŭ tri sufiĉos) de la diversaj revuoj aŭ gazetoj esperantaj kaj unu ekzempleron de la ĉefaj esperantaj eldonaĵoj. La Amiens'a grudo estos ankaŭ tre danka al la fremdlandaj esperantistoj, kiuj faros al ĝi la ĝentilecon sendi ĉu poŝtkarton, ĉu komercan prospektuson, ĉu ian ajn interesan esperantaĵon.

Siavice la Amiens'a grupo faros, dum la tuta daŭro de la ekspozicio, specialan aranĝon, por ke ĉiuj fremdaj esperantistoj vizitantaj ĝian urbon trovu laŭ bezone ĉe ilia alveturo samideanon el la grupo por ilin gvidi kaj akompani.

Je la nomo de la Komitato :

La profesoro-bibliotekisto,

G. QUESTE.

LA MORTO DE MARTINO, LA PAŜISTO

Speciale esperantigita por *Alyeria Stelo.*

Anekdoto de la ribelo de 1898, en Milano

SEKVO

Eble tio estis la alvoko el liaj mortintaj geparencoj ? aŭ la la dezirema krio al Dio kaj la rideto de lia animo, kiu konsumiĝis en katenoj kaj celis al baldaŭan liberecon ?

Plenege kaj superfluanta estis de Martino l' animo, simila je la vinberujo, kiu ŝarĝata per ĝiaj fruktoj kaj faldanta por la pezo, bonan rikolton promesas.

Ĉion li estis doninta por sia animo : li estis tute malpleniginta la maldolĉan kalikon, kiun trinkigis al li saĝeco, tial, spiregeme li enspiris sunan fonton kaj salutis ĝian lumon.

Tomaso rigardis sian patron. De l' lito de la mortanto, kiu nun ekstere ekzistis per la supernatura vivo, ekvenis ĉarma sento, kiu al li malsupreniris. Malproksimaj kaj malklaraj operaĵoj revenis sian memoron, malprecize, sed pro tio agrable ; jen estis : la baptfonto, la altaro de la kampara preĝejo, kiu ŝirmas kompateblan kaj nevideblan Dion, tra ora lumo de alpendigitaj lampoj, kiujn li vidis brili tra la fenestro, en nokta lumo, kaj kiuj al li ŝajnis lumoj de Jesuo ; bonodorfumo ; Dipatrina vizaĝo, kiu staris inter la iluminado de kandeloj ; la noktomeza Meso kaj la Kristnaska ŝtipo ; la ĉerko de lia mortinta fratino kaj la floraj girlandoj por ŝia enterigiro ; la tombo de Kristo, kovrita per suprenrampantaj hederoj, kaj la Paska ŝafido ; la pr cesio tra la torda vojeto inter fioritaj stipoj ; la amema preĝo de la patrino, kiun li lernis sur ŝiaj genuoj, fine la unua komunio.

La UNUA KOMUNIO ! Nune, li revidas ĝin, kiel per neta apero : li iris preĝejon, kiel li irus feston de anĝeloj. Li vestis palbluan veston. Siaj haroj, bukle falis je sia frunto : li ŝajnis teran anĝeleton. Sian preĝlibron li tenis je l' mano kaj sia patrino lin akompanis. Rigardis sia Jesuo ĉe hostio : li vidis en ĝi tiom da brilo, kaj aŭdis voĉon, kiu al li diris : « Venu, ĉiuj venu ! »

(Daŭrigota)

DON BERNARDINO RICCI.

Esperantigis GRAFFO ALBERT GALLOIS.

Dekkvinaŭgusta Ordenito

Daŭrigo

Tiam la kafeisto ekbruligis la fajrejon, metis sur ĝin du bolileto jn kaj, dum li pretigis por ni la kafon, ni povis ricevi de li kelkajn klarigojn pri la vojaĝo de lia mastro kaj la stranga nezorgeco en kiu estas la gento. La Kabilo rapide parolis kun gestoj de maljuna virino, per bela gorĝa lingvaĵo jen akcelata, jen interrompata de grandaj silentoj. dum kiuj oni aŭdis la pluvon, kiu falis sur la mozaikon de la internaj kortoj, la bolilojn kiuj kantis, kaj la bojojn de l' ŝakaloj dissemitaj je miloj sur la ebenaĵo.

Jen kio okazis al la malfeliĉa Si-Sliman. Antaŭ kvar monatoj, la dekkvinan de aŭgusto (imperiestra festtago), li estis ricevinta tiun faman ordenon de la Honora Legio, kiun li atendis de tiel longatempe. Li estis la sola aga'o en la provinco ne ĝin posedanta. Ĉiuj aliaj estis kavaliroj, oficiroj eĉ du aŭ tri portis ĉirkaŭ sia ĥaik'o la Grandan Rubandon de komandoro kaj, tute naive, en ĝin purigis sian nazon kiel multefoje ni vidis la baŝaga'on (1) Bualem tiel farantan.

Ĝis nun malebligis ke Si-Sliman estu ordenita, ia disputo, kiun li havis kun franca oficiro, estro de la araba oficejo post kunludo per ludkartoj, kaj la kamaradeco inter militistoj estis tiel potenca en Alĝerio ke, de dek jaroj, la nomo de l' aga'o, ĉiam enskribita sur la proponitaj nomaroj, ne sukcesis. Tial vi povas imagi kian ĝojegon sentis la estiminda Si-Sliman kiam, la dekkvinan de aŭgusto matene, milita rajdisto el Orleansville alportis la etan juvelujon kun la atesto de legiano, kaj Baja, la plej amata el liaj kvar edzinoj, alkroĉis la krucon de Francujo]sur lian burnuson faritan per kamelaj haregoj.

(Daŭrigota)

A. DAUDET.

Esperantigis A. BAISSAC.

1) Subestro, subaga'o.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accent. de la Maison TURLOT, CHAIX et C^ie^, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo

5 Februaro 1906. DUA JARO N° 3 (21)

LA ALĜERIA STELO

OFICIALA ORGANO
De la Grupo Esperantista de Alĝero
KAJ DE LA NORDAFRIKO

Oficiala Parto

Grupo Esperantista de Alĝero

KAJ DE LA NORDAFRIKO

RÉUNION DU COMITÉ DU 25 JANVIER 1906

Dans sa réunion du 25 janvier dernier, le Comité du Groupe espérantiste d'Alger et de l'Afrique du Nord a désigné les membres du bureau pour 1906.

Ont été élus : Président, M. AUBERT ; Vice-Présidents, MM. BRESSON et SAUSSOL ; Secrétaire Général, M. ROUX ; Trésorier, M. MOINARD.

A ALGÉSIRAS

L'Europe entière a les yeux fixés sur la conférence d'Algésiras. Il a semblé au Groupe espérantiste d'Alger que l'heure était favorable à une réclame mondiale autour de l'Esperanto, langue neutre internationale auxiliaire. Ne serait-il pas possible de faire de l'Esperanto la langue officielle des diverses administrations de contrôle à établir au Maroc ?

Sous le pseudonyme « Verda Stelo », un membre du Groupe a publié, le 26 janvier dernier, dans « Les Nouvelles », quotidien du soir, à Alger, un article intitulé : « AU MAROC », dans lequel il s'applique à démontrer : 1-o que nulle langue nationale européenne ne pourrait être introduite comme langue officielle au Maroc, sans de nombreux et graves inconvénients ; 2-o que le latin ne peut être recommandé ; 3-o que l'Esperanto a fait ses preuves et mériterait d'être essayé.

Le Groupe d'Alger a adressé à M. Révoil, représentant de la France à Algésiras, une collection d'ouvrages espérantistes.

Par la présente note, il convie tous les groupes espérantistes d'Europe à envoyer sans tarder, au représentant de leur nation à Algésiras, des notes attirant l'attention sur l'Esperanto. Les Groupes de Londres, Bruxelles, Berlin, Vienne, etc., sont invités spécialement à joindre aux leurs quelques spécimens de leurs grammaires et dictionnaires esperanto.

S'il est répondu à cet appel avec un ensemble suffisant, il n'est pas douteux que la cause de l'Esperanto aura fait un pas décisif.

A. — Modèle de pétition à adresser aux membres de la conférence.

B. — Liste des chefs de mission à la conférence d'Algésiras.

(Voir a la fin de la traduction esperanto de la note ci-dessus).

ĈE ALĜEZIRAS

La tuta Eŭropanaro atentas pri la Alĝezirasa kunveno. Ŝajnis al la Alĝera Grupo esperantista, ke la momento estas favora por tutmonde reklami pri Esperanto, neŭtra internacia helpa lingvo. Ĉu ne estus eble uzi Esperanton kiel lingvo oficiala ĉe la diversaj Eŭropaj kontrolaj administracioj baldaŭ organizotaj en Maroko ?

Sub la pseŭdonomo « Verda Stelo », ano de la Alĝera Grupo publikigis, la 26-an de januaro, en la ĉiutaga alĝera ĵurnalo « Les Nouvelles », artikolon titolitan : « AU MAROC », en kiu li klopodas elmontri : 1-e Nenia nacia lingvo eŭropa povus, sen multaj kaj gravaj malhelpoj, esti uzota kiel lingvo oficiala en Maroko ; 2-e La lingvo latina ne taŭgus por tiu ĉi uzado ; 3-e La lingvo Esperanto faris jam siajn pruvojn kaj estas provinda.

La Alĝera Grupo jam sendis al S-ro Révoil, riprezentanto de Francujo ĉe Alĝeziras, kolekton de esperantistaj verkoj.

Ĝi invitas ĉiujn esperantistajn Eŭropajn grupojn sendi sen prokraste al ilia nacia riprezentanto ĉe Alĝeziras notojn atentigantajn al Esperanto La grupoj de Londono, Bruselo, Berlino, Vieno, k. c., estas speciale petataj sendi, kune kun ilia petnoto, gramatikajn kaj vortarajn specimenojn.

Ĉiuj Eŭropaj esperantistoj estas same petataj sendi al Alĝeziras ĉu leteron, ĉu poŝtkarton ŝatantajn Esperanton.

Se tiu ĉi alvoko ricevos sufiĉe multajn respondojn, la afero esperanta nepre faros decidigan paŝon.

A. — Specimeno de skribaĵo sendota al la anoj de la Alĝezirasa Kunveno :

Mi subskribinta, respekte prezentas al S-ro _____, ĉefdelegito de_____ ĉe l'Alĝezirasa Diplomatia Kunveno, esprimon de fervora deziro por prova uzado de Esperanto en Maroko kiel neŭtra internacia oficiala lingvo.

(Subskribo).

B. — Nomaro de la misiestraj Moŝtoj :

S-roj RÉVOIL, por Francujo ;
De RADOWITZ, por Germanujo ;
VISCONTI-VENOSTA, por Italujo ;
WHITE, por Amerikujo ;
CASSINI, por Rusujo ;
NICHOLSON, por Anglujo ;
Duko de ALMODOVAR, por Hispanujo.

Neoficiala Parto

Alĝera Esperantista Laboristaro

Dank' al sindona fervoro de S-ro Aprosio, Alĝera socialista urbkonsilanto, fondiĝis en Alĝero, la lastan monaton decembron, laborista esperantista grupo, sub la nomo « Alĝera Esperantista Laboristaro », kies sekretario estas S-ro Aprosio. Oni scias, ke ĝenerale la socialistaj unuiĝoj, ne akceptas ian prezidanton.

S-ro Aprosio estas tre dolĉa, afabla, 35 jara tipografisto-ĵurnalisto, kies influo ĉe la alĝeraj laboristoj estas tre grava. Li ne estas iu el tiuj revolucianoj kiuj nur puŝas al malamo je la riĉuloj kaj potenculoj ; li havas precipe kompateman koron por la mizeroj de la kunaj gelaboristoj, kies sorton li provas plibonigi per unuigeco kaj solidareco. Kunhelpo de tia viro estos utilega por nia afero.

Tridek anoj estas surskribitaj sur la etato de la sabata kurso : forĝistoj, masonistoj, braklaboristoj, komercaj oficistoj, k. t. p., ĉiuj deziregemaj lerni Esperanton por fari al si pravan opinion rilatan al sentoj kaj bezonoj ĉe alilanda laboristaro. kaj por skribe aŭ parole prepari kun ĝiaj anoj, per korespondadoj kaj ĉe inter-

naciaj kongresoj, plibonigon de l' sama sorto. Inter ili, ni citu ankaŭ du junajn knabojn, apenaŭ dekjarajn, tre lernemajn kaj inteligemajn, kiuj promesas altiri al la kurso siajn kamaradcjn por kune kolekti belajn poŝtmarkojn kaj ilustritajn poŝtkartojn.

Jam « Esperantista Laboristaro » korespondas kun diversaj fremdaj socialistoj, nome kun S-ro Goetz, de Frankfurto apud Meino, kiu sendis al ĝi tre interesajn sciigojn pri la sociala movado en Prusujo ; S-ro Padfield, de Ipswick (Anglujo), kiu konatigis al ĝi adresojn de multaj anglaj socialistoj ; S-roj Hugo Leser (Barmen, Germanujo), Sejka (Schwechat, Aŭstrujo), Hakansson (Stockholmo, Svedujo), kaj kelkaj aliaj.

« Alĝera Esperantista Laboristaro » jam intencas proponi al siaj korespondantoj fondi formatmalgrandan politikan esperantistan ĵurnalon, per kiu estus akordigataj la penoj de l' esperantista laboristaro por plimallongigo de l' taga labortempo, pligravigo de salajroj, dimanĉa libertempo, kaj montro per faktoj de l' praktika utileco de Esperanto por la laboristaro.

Estus vere tre dezirinde ke en nia urbo iniciatus instruistoj, kuracistoj, k. t. p. tiel fervore kiel la laboristoj.

VERDA STELO.

DIVERSAĴOJ

KELKAJ TROJANAJ KUTIMOJ AŬ SUPERSTIĈOJ.

(Daŭrigo)

4) Ĉe niaj vilaĝanoj, la junaj edzinoj, dum la unuaj du tagoj post ilia edziniĝo, ne elparolas eĉ vorton al sia bopatrino, ĉar kontraŭokaze, ili montrus malestimon al la bopatrino.

5) Kiu, la 23-an de aprilo, estas sukcesinta baniĝi plej frumatene en la rivero, tiu dum la tuta jaro ne malsanas !

6) Ni kredas, ke se la 6-a de januaro la rivero estas glaciigita. la jaro estos fruktodona, kontraŭokaze, estos malsatado.

(Daŭrigota) P. STOJEV, Trojan (Bulgarujo)

LA KREO DE LA PULOJ

(FABELO POPOLA FRANCA)

Iam la Bona Dio promenis kune kun Sankta Petro sur valeton tre mallarĝa de Francujo. Promenante ili babiladis pri aferoj de la mondo, kaj pri la malfacila direkto de tiuj.

Subite, al kurbiĝo de la rivelo, Sankta Petro montris al l' Eterna Patro virinon vestitan per ĉifonaĵoj kuŝitan sur la sablo luma ; juna, ŝi ŝajnis enui multe.

Bona Dio, kiu scias tuton, tuj vidis ke tiu ĉi virino enuis de ne okupo. Estanta senlime bona, Dio eltiris el sia poŝego plenmanon da puloj kaj ĵetis ĝin sur la junulino, dirante : « Virino, la neokupo estas patrino de tutaj malvirtoj, jen estas por okupi vin. »

De tiu tago, virinoj havis puloj, kaj, kiam estas nenion farantaj, ilin amuzas elpulantaj sin.

Esperantigis D-ro L. B.

Kiel oni devas starigi la Litojn ?

Ĉu oni devas dormi kapo al nordo, sudo, oriento aŭ okcidento ? Ofte estis farita la demando, sed neniam ĝi ricevis kontentigan respondon. Eble la plej multo da homoj malofte pensis pri ĝi, aŭ se la penso prezentiĝis, ĝi estas forigita kiel negrava afero. Novaj esploradoj tamen montras ke dum dormado la plej bona pozicio estas kapo al nordo, piedoj al sudo. Eĉ oni konstatas ke nedormado ofte estas kuracata de la alpreno de ĉi tiu pozicio. De tio oni opinias ke pro kaŭzoj ne klarigitaj, la terfluoj agas sur la homa organismo. Dum tempo de vekado, male, ŝajnas preferinda sin turni al okcidento, precipe kiam oni laboradas, ĉu spirite, ĉu fizike.

Pli ol unu literaturisto certigas ke iliaj ideoj fluas pli libere kiam ilia skribtablo starigas al okcidento. Kelkaj profesorinoj de muziko ankaŭ diras ke iliaj lernantinoj ludas fortepianon multe pli facile, kiam la muzikilo staras en la supredirita pozicio.

La plej multo da grandaj urboj inkliniĝas vaskiĝi al okcidento, kaj ĉiuj grandaj migradoj de l' homaro okazis de oriento al okcidento, tio estas kontraŭe al la direkto de l' terturniĝo. La trunkoj, kaj branĉoj de arboj simile inkliniĝas plivole de oriento al okcidento.

Estas ankoraŭ pruvita ke oni sentas muskolan lacecon pli malmulte rapide, kiam laboristo alprenas tiun ĉi pozicion.

Kvankam la afero estas nekomprenigebla, ŝajnas tute nature supozi ke la turnigado de l' Globo igas ian influon sur ĉiuj kreitaĵoj, ĉu homoj, ĉu kreskaĵoj.

Ĉu iu el niaj estimataj legantoj jam faris observadojn pri tiu ĉi interesa afero? Se tio estas, ni tre petas ke ili bonvolu nin sciigi.

El Londona gazeto « The Grand »

Esperantigita Fraŭlino E. J. C.



Speciale esperantigita por *Algeria Stelo*

LA MORTO DE MARTINO, LA PAŜISTO

Anekdoto de la ribelo de 1898, en Milano

SEKVO

Li kredis nun vidi la kerubojn kun flamaj flugiloj, kiuj, aere, al li portis tiun hostion.

Li estis feliĉa, feliĉega. Kaj sia patrino, genue, apud li, rigardis lin per okuloj malsekaj pro larmoj de ĝojo. La kampara preĝejeto estas tute piena da gepersonoj, kaj resonis per la kantoj de l' junaj paŝistinoj. Li supreniris la patran domon, li vidis la blankajn murojn lumigitajn per lumo kaj tra la fenestro filtris la lumo de la kutima lampelo, li aŭdis malproksime la dolĉan voĉon de patro Miĥelo kaj de sia patrino.

Sed, inter ĉiuj memoraĵoj, ĉe lia koro moviĝis io similanta je l' maltrankvileco de l' pilgrimanto, kiu perdata en arbara labirinto penas por retrovi la lumon kaj la brilon de la ĉielo.

Subite, senintermitanta kaj mallaŭte bruo, kiu ŝajnis flugo de abelaro, frapis lian orelon. Li kliniĝis super la balkono kaj rigardis. Tuj li vidis malsupre, tra polva nubo, en la

senkompata sunlumo, nekalkuleblan amason da viroj, virinoj kaj infanoj, ĉifonaĵe vestitaj, kiujn antaŭiris Mario, lia filo, kiu kriegis svingante ruĝan standardon.

Tomaso vidis tiun bandon posedantan de perfida demono ; li divenis la kriojn mallaŭte elparolitajn per raŭkaj kaj malamegaj voĉoj ; li rimarkis tiujn vizaĝojn malbonformigitajn per terura tordiĝo de la muskoloj, tiujn okulojn flamigantajn, kiuj en la pupiloj montris nur solan flamon, la flamon de enviema malamo, kiu volas trabati per piedoj, detrui, mortigi. La movoj de iliaj lipoj subite aliformiĝis ; teruraj kriegoj kaj senkompataj minacoj krevis. Besta forto trairis la rangojn de tiu ĉi densa amaso da homa karno, kiu antaŭensaltis kontraŭ negocejoj kaj butikoj, kvazaŭ sovaĝaj bestoj sur ilia kaptaĵo.

Rapide, la belegaj vitraroj estis disrompintaj ; vazoj kaj mebloj ruiniĝis ; ĉiuj aferoj terfalis. La vitreroj reŝprucis je la atakantojn. Torfo, kiu postulis panon, ĉirkaŭigis publikajn konstruaĵojn, aliaj ribelantoj atakis la pordojn de la burĝaj loĝejoj, kaj kriegis : Morton !

Kiel uragano, per ruinebla kurado, anarkio pasis. El la negocejoj elvenis fumo, kvazaŭ polvo de vastega ruinigo : poste, pligrandiĝis la insultoj de l' popola amaso, kiu ĉiumomente kreskis. Tomaso estis aŭdinta la sonon de l' milita trumpelo, kaj la bruon de la kavaleria regimento, kiu atakegis la ribelantojn.

Nevenkebla instinkto instigis tiun amason defendiĝi kaj ataki. Tremeto simila je furioza vento trapasis ĉiujn, kaj la bando decidis fari teruran batalon. En tiu momento, la kavaleria regimento vivege atakegis. Akrasone, kugloj fajfis. Oni aŭdis kriegojn, poste mallaŭtajn ĝemojn ; fine, grandegan bruegon. Blanka fumo brile, de la batalkampo, supreniris al la suno, al la paca ĉielo !

(Daŭrigota)

DON BERNARDINO RICCI.

Esperantigis GRAFFO ALBERT GALLOIS.

L'Imprimerie TORRENT, 57, rue d'Isly, Alger, livre aux Espérantistes de superbes cartes de visite, portant, sur le coin gauche (impression verte), le mot « Esperanto » au-dessus de l'étoile espérantiste. Le prix est de 3 francs le 100 (0,25 en sus pour envoi postal). Le numéro d'ordre, imprimé en noir, peut être ajouté au-dessous de l'étoile.

Dekkvinaŭgusta Ordenito

Daŭrigo

Pro tio okazis ĉe liaj gentanoj diffa'oj (1) kaj fantazia'oj (2) senfinaj. La tutan nokton la tamburetoj, la kanaj flutoj sonadis. Okazis dancadoj, fajregoj pro ĝojeco ; mi ne scias kiom da ŝafoj estis mortigitaj ; kaj por ke nenio manku ĉe la festo fama verkisto verkis por la honoro de Si-Sliman belegan kantadon komencante jene :

« Vento jungu viajn rapidegajn ĉevalojn por disporti la bonan sciigon. » La morgaŭon, tuj post la tagiĝo, Si-Sliman ordonis al sia tuta gum'o (3) ke ĝi rajdu kaj kune kun ĝi li aliris Alĝeron por danki la guberniestron. Ĉe la urbaj pordoj la rajdistaro haltis laŭ kutime La agao iris sola la gubernipalacon, sin prezentis al Duko de Malakof kaj certigis lin pri sia sindono al Francujo, ĉio tio dirita por liu orienta kaj metafora stilo en kiu, de tri mil jaroj, ĉiuj junaj homoj estas komparitaj je palmarboj, ĉiuj virinoj je gazeloj.

Plenuminta tiujn devojn, li supreniris la altan urbon por sin montri ; pasante li faris siajn religiajojn en la mahometana preĝejo, disdonis monon al malriĉuloj eniris ĉe barbiroj kaj brodistoj, aĉetis por siaj edzinoj akvaĵoj nbonodorajn, silkajn ŝtofojn kun grandaj kolorigitaj floroj, bluajn korsajetojn ore pasamentitajn, ruĝajn botojn de rajdisto por sia agaido, pagante sen marĉando kaj diverŝante sian ĝojon per belaj moneroj. Oni vidis lin en bazaroj sidantan sur tapiŝoj de Smirno, trinkantan kafon ĉe la pordo de maŭraj vendistoj, kiuj lin gratulis. Ĉirkaŭe li, la popolamaso sciema multiĝis.

(Daŭrigota)

A. DAUDET.

Esperantigis A. BAISSAC.

---

1) Publikaj festenadoj.

2) Kuradoj de arabaj rajdistoj kiuj kriadas kaj pafadas per pafiloj.

3) Rajdistaro.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accent. de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris

Michel Lledo